# KOMITATAJ FORUMOJ PRI STRATEGIO, Burno, 2025

***Ĝeneralaj konsideroj:***

**Ni havas bonan liston de ideoj, tamen necesos prioriatigi la subajn, ĉar ni ne povos labori pri ĉiuj laŭ la sama ritmo. Kiujn homfortojn ni havas en UEA kaj asociitaj grupoj?**

**Por ĉiuj kolonoj de KIRI, necesas planoj por komisioj kaj laborgrupoj kiuj...**
**... havas tre klaran strukturon, kun fidinda kvalifikita gvidanto kiu raportos al la Estraro.**
**... havas celnombron de partoprenantoj, kiuj restos fidelaj al la laboro kaj regulaj diskutoj,**
**... havas difinitan tempon por plenumo, kiu povas esti parto de pli granda plano.**

## 1. KUNLABORADO

Interna kunlaborado estas unue la antaŭkondiĉo por harmonie atingi komunajn celojn kiuj troviĝas preter la kapablo de individua agado. Kiam ni havos klaran strukturon, celojn kaj laborplanojn, per informiĝo, edukiĝo kaj trejnado, ni povos plenfide rilati kun eksteraj organizaĵoj.

Ni faciligu kunlaboradon inter esperantistoj per la jenaj rimedoj:

A. **Modernigita retejo** por aŭtomatigi administrajn kaj financajn procedurojn, faciligi servojn al la membroj per provizo de necesaj kontaktoj, materialoj, mendiloj, aliĝiloj, membreco-renovigoj.
1. Intervjuoj de kandidatoj por fina pritakso de la proponita sistemo (AKSO), kompare kun alternativoj, por okaza kaj daŭra konsultado, kaj akompanado al la oficistoj kaj kunlaborantoj por la transiro al la nova sistemo: Julio-Aŭgusto 2025. **Notu ĝisdatigitajn datojn.**
2. Finaj rekomendoj de la taksantoj kaj konsultantoj: Septembro-Oktobro 2025.
3. Dungo de la akompananto al la sistemo: antaŭ la fino de 2025 (se decidita kiun sistemon uzi).

**La partoprenantoj konsentas ke necesas progresigi la projekton AKSO k.e.p. rapide, tamen kun tempo por ĉion pritaksi plene kaj senhaste.**

B. **Trijara Almanako** reta kaj presita por kunigi ĉiujn necesajn informojn pri la Asocio, ĝiaj Landaj Asocioj kaj reprezentantoj, kunlaborantaj partneroj, agadraportoj, estontaj planoj.
1. Verkado, kolektado, redaktado de la materialoj, unua duono de 2025.
2. Publikigo de la unua Trijara Almanako, dua duono de 2025.

**La partoprenantoj konsentas pri la valoro de la Almanako, kaj komprenas ke ekzistas limigoj rilate la publikigon de detaloj pro datuma konfidenceco. Ili tamen rekomendas laŭeble investi la tempon por havigi la necesajn skribitajn permesojn, kaj nepre disponigi informojn por kontaktoj pri Faka Agado. La Almanako havos ĝisdatigeblan retan version, kaj ankaŭ presitan laŭmende dum restos intereso.**

C. **Komitato**
1. Ni restu atentaj al la gvida rolo de la Komitato, kuraĝigu aktivan engaĝiĝon de la Komitatanoj, kaj estu atentaj ke ni raportas decidojn kaj agadplanojn laŭ iliaj bezonoj.
2. La Komitato estu preta por apogi la necesan reviziadon de la Statuto kaj Regularoj de UEA.
3. Ni krome esploru ĉu fondi laborgrupon por esplori pri la eventuala neceso restrukturi la organizadon de UEA por ke estu pli da opcioj por komuna agado ol per la Landaj Asocioj.

**La partoprenantoj konsentas pri 1. kaj 2.**

D. **TEJO**
Pro la neceso plijunigi la movadon, ni restu en konstanta kontakto kaj kunlaboro kun TEJO pri projektoj de komuna intereso (ekzemple subteno al la Internacia Junulara Kongreso en Azio).

E. **Dezirindaj celoj**

1. Trejni laŭbezone por pli efika laboro (konfliktsolvado, konsilejo: mediaciado? ombudsmano?).
2. Stimuli kunlaborigadon de malsamcelaj individuoj por realigi komunajn projektojn.
3. Doni pli da subteno al Landaj Asocioj kaj kuraĝigi al pli da interasocia kaj regiona kunagado.
4. Atenti doni sufiĉan subtenon al la faka agado por kontraŭi la tendencon al malfortiĝo.
5. Subteni iniciatojn por kreo de novaj fakaj asocioj necesaj por apogi agadon en kampoj kiuj gravas por la antaŭenigo de la servoj de UEA, ekzemple Faka Asocio de eldonistoj.
6. La Estraro de UEA kunlaboru kun TEJO por la ekuzado de komuna projektmastrumilo.

**Komuna projektmastrumilo ŝajnas dezirinda se tio estas interkonsentita.**
**Aliaj punktoj sen diskuto, sed necesas prioritatigo.**

E. **Centra Oficejo kaj financa bazo**

1. Ni restu pretaj vendi la Centran Oficejon je oportuna momento (tempe kaj finance).
2. Intertempe ni esploru la eblon ludoni portempan spacon al eksteruloj por oficejoj.
3. Post la vendo, ni estu pretaj investi en alia nemoveblaĵo por apogi la laboron de UEA.
4. Ni certiĝu ke la Volontula Domo povos servi post la vendo kiel oficiala sidejo de UEA.
5. Ni estu pretaj aĉeti laŭbezone pli ampleksan spacon se tio montriĝos dezirinda.
6. Ni laboru por identigi la plej taŭgan alternativan lokon por la Libroservo post 2025.
7. La Financa Komisiono daŭre studu la kondiĉojn por investoj sub ŝanĝiĝantaj kondiĉoj.
8. Ni daŭrigu uzadon de eksteraj revizoroj kaj premu por ĝustatempa livero de raportoj.
9. Ni kunlaboru pri uzado de la kapitalo de Institucio Hodler '68 por subteni al UEA.
10. Ni daŭre kunlaboru kun Kosmo Strategio pri akiro de estontaj Administraj Subvencioj.
11. Ni daŭre atentu la financan situacion de nepagipovaj aktivuloj kiuj bezonas helpon.
12. Ni konsciu pri la bezono repagi kostojn de volontuloj kiuj reprezentas al UEA.
13. Ni daŭre restu pretaj provizi financan helpon por membroj en krizaj situacioj.

**Sen specifaj komentoj, sed ĉeestantoj menciis la deziron havi portempan oficejon en Roterdamo kun bazaj funkcioj de Centra Oficejo kiam vendiĝos la nuna domo. Ni daŭre serĉas lokon por la Libroservo (4 eventualaj kandidatoj), sed la nuna Libroservisto ĝuas la laboron kaj pretas servi laŭkontrakte ĝis ni trovos solvon.**

F. **Subteno de la kulturo de Esperanto**

Daŭrigi subtenon kaj kuraĝigadon de Belartaj Konkursoj, arto, muziko, eldonado de literaturo.
Daŭrigi kunlaboron kun la Akademio de Esperanto kaj aliaj institucioj apogantaj la lingvon.
Resti en kontakto kun la diversaj kulturaj centroj de Esperanto kaj subteni iliajn programojn.
**Sen diskuto.**

G. **Esperantaj organizaĵoj eksteraj al UEA**

Prioritatigi restadon en harmoniaj rilatoj kun ĉiuj organizaĵoj kiuj subtenas la lingvon, kulturon kaj literaturon de Esperanto, kaj ĝian aktivan uzadon por pozitivaj celoj.
**Sen diskuto.**

## 2. INFORMADO kaj komunikado (finraportota post la Forumo de la 1-a de aŭgusto)

*La laborgrupo kunlaboranta kun la Komisiito de UEA prioritatigu la eblajn agadojn.*

1. Organizi sub la gvido de komisiito de UEA laborgrupojn kun grupestroj kaj membroj dediĉitaj al la antaŭenigo de la diversaj flankoj de informado: teni plene funkcianta teknike kaj enhave la multlingvan retejon *esperanto.net,* al kiu sendiĝas legantoj de reklamoj kaj artikoloj pri Esperanto; utiligo de eventoj kiel kongresoj por diskonigi Esperanton (gvidilo, trejnado); amaskomunikiloj (trejnado por kontaktoj kaj intervjuoj, preparo de materialoj); sociaj retoj (oportuneco de agado, komunikado); respondoj al kritikoj kaj misprezentoj (help-dokumento, reaga teamo); kontaktoj al opinigvidantoj (politikistoj, ĵurnalistoj, edukistoj); konstanta fluo de bultenoj aŭ gazetaraj komunikoj kiuj celu eksterajn informfontojn, ne nur la internajn de UEA.
2. Krei tabelon pri "Kiu faras kion?" por konscii ĉu mankas homfortoj por esencaj taskoj.
3. Provizi k.e.p. multajn diverslingvajn modernajn materialojn por diskonigo de Esperanto.
4. Trejni membrojn por pli efike rilati al la diversaj amaskomunikiloj por apogi Esperanton.
5. Plifortigi internan komunikadon de UEA al membroj kaj partneraj asocioj.

6. Ĝisdatigi la retejon de UEA antaŭ plena renovigo pro kadukiĝintaj informoj.
7. UEA periode pretigu modelon de gazetaraj komunikoj okaze de kongresoj kaj niaj oficialaj tagoj
UEA reorganizu la servon por reagado ĉe gazetaro
UEA aktualigu kaj promociu esperanto.net

## 3. RILATOJ kun la ekstera mondo (atentu la grasigojn)

*La ĉefa tasko estas trovi homfortojn kaj organizi iliajn agadojn.*

1. Daŭrigi subtenon de oficejoj kaj agado ĉe UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.
2. Subteni CED kaj ESF en la daŭra organizado de konferencoj, simpozioj, seminarioj kiuj helpas al niaj partneroj atentigi pri lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio, solvoj por komunikaj problemoj.
3. Kuraĝigi esperantistojn al aktiva engaĝiĝo kun lokaj asocioj havantaj mondan perspektivon.
4. Organiziĝi kaj prepariĝi por peti agnoskon de Esperanto (Esperanto-tago, asembleoj de UN, Unesko, kaj iliaj neregistaraj organizaĵoj [NROj], parlamentoj).

**Plano: Delegacio de UEA en Samarkando en novembro por peti rekonon de Esperanto-Tago. Ni faru la plej efikajn planojn kaj preparu la plej celtrafajn materialojn, ĉar malmultaj neprofitcelaj asocioj povos iri al Samarkando, do ni povos elstari.**

5. Diskonigi kaj kuraĝigi al partopreno esperantistajn kaj interesatajn esploristojn en konferencoj, seminarioj kaj eldonprojektoj.
6. Proponi al aliaj asocioj servojn kiujn ni kapablas liveri per niaj transnaciaj kontaktoj
(tradukado, interpretado, eldonado, kunorganizado de eventoj kiel seminarioj ĉeestaj kaj retaj, plani por aliaj agadoj por kiuj ni povos esti pretaj liveri servojn, ekzemple trejnado pri Interkultura Kompetento). **Atentu kio estas realisma, kaj prioritatigu agadojn por kiuj ni havas la homfortojn kaj financan apogon, kiam necese.**
7. Studi ĉu kaj kiel ni kapablas subteni financajn kampanjojn de aliaj organizaĵoj, por povi kunlabori en bonfara agado kiu ne necese rilatas al Esperanto. **Valoras enketi pli pri tio, ĉar tio ne estas nia nuna politiko.**

## 4. INSTRUADO

### Ĝenerale akceptita kiel plano por antaŭeniri, tamen necesas prioritatigi, ĉar ne cion oni povos trakti kun la sama ritmo. Ni donu pli da atento kaj pensado pri punktoj 7 kaj 10.

1. Kunlabori kun ILEI por helpi realigi ĝiajn celojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj.
2. Alporti la rimedojn de UEA kunlabore al realigo de la Strategia Laborplano de ILEI.
3. Subteni la laboron de *edukado.net* kaj la KER-ekzamenoj por kvalifiki instruistojn.
4. Kuraĝigi al subvencipetado por helpi lernejojn kaj edukajn instancojn atingi siajn celojn uzante Esperanton kiel instrumenton por transnacia interkompreniĝo. Subteni projektojn kiel la 30 Oraj Horoj kaj la Multlingva Akcelilo por progresi al organizitaj internaciaj eksperimentoj pri la valoro de Esperanto kiel eduka instrumento, faciliganta lingvolernadon kaj transkulturan interkomprenon inter samaĝaj lernejanoj.
5. Subteni la partoprenon de kvalifikitaj universitatanoj en profesiaj lingvokonferencoj.
6. Daŭrigi la trejnadon pri Interkultura Kompetento por movadanoj kaj por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto kiuj povos plifortigi siajn kursojn per trejnado de lernantoj ne nur pri la lingvo sed pri kultura alproksimiĝo al alilingvaj kaj alikulturaj lernantoj.
7. **Longdaŭra laborgrupo de UEA kaj ILEI por organizi internacian eksperimenton pri la valoro de Esperanto kiel lernfaciligilo por lingvoj, kaj instrumento por kreskigo de interkultura kompreniĝo.**
8. Subteni universitatnivelan instruadon de Esperanto, inkluzive la Katedron pri Esperanto kaj Interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo.
9. Apogi iniciatojn kiel la laborgrupo pri kunpensigado de universitata agado.
10. **Kunlabori por faciligi rilatojn inter esperantistaj universitatanoj, kaj labori por esplori pri la eblo starigi aŭ apogi novan iniciaton kiu anstataŭu la programon kiu finiĝis en Poznan.**
11. Konsideri la regularon de la ILEI-UEA-ekzamenoj por reaktivigi/inkluzivi retan ekzameniĝon